FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

Nº 35a (nova serio) - Nº 120a - Marto 1976

**Prizorgas :** Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN .

**Eldonita de :** la ESPERANTO - Grupoj de la Ruena Regiono .

**Sendu la manuskriptojn antaŭ la :** 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -

**UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :** c.c.p. : ROUEN 285 40 H .

**Kotizoj :** Por 1976 : Minimuma kotizo : 5,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 5,00 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

## AŬSKULTU LA RADION EN ... ESPERANTO KOMPRENEBLE !

Tio ŝajnas al vi tiel malfacila, ke vi eĉ ne provas !....

Vi eraras : persone mi ofte aŭskultas, kaj post kiam vi, la unuan fojon sukcesas kapti elsendon sur la agordoplato, tio iĝas komuna afero. Vi kontraŭdiras : mia ricevilo ne estas sufiĉe bona ! eble vi ne povos ĉion kapti, sed radio BERN estas sufiĉe forta sur 49 metroj kaj radio VARSOVIO sur 200 metroj, ankoraŭ radio VIENE, kaj multaj ricevi--loj permesas kapti ilin.

La plej bona metodo por retrovi facile la lokon sur la agordo plato, estas glui pape--reton je la loko.

Mi aldonas la hortabulojn de la ĉefaj radiostacioj, riceveblaj en Francio. Vi vidas ke vi povas elekti !

Oni povas ankoraŭ kapti la eŭropan reton de la radioamatoraj esperantistoj, sed tiam oni bezonas posedi pli komplikan kaj specifan aparaton ! Por la interesatoj, mi povas doni pli precizajn informojn kaj kelkajn alvoknumerojn de aktivaj radioamatoroj.

Skribu al la diversaj redakcioj por peti informojn ! Tio helpos ilin kaj ili ĉiam respondas !

Bonan aŭskultadon !

Sro CHAIM Alain , 8 place Albert René. 76600 LE HAVRE.
Tel. : (35) 21 10 25.

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais . DEPOT LEGAL : 4e Trimestre 1976
Le gérant : P. LEMARCHAND.

# RADIO - ELSENDOJ

| | | HOROJ | METROJ | KHz | |
|---|---|---|---|---|---|
| Radio ROMA – Esperanto Fako<br>C.P. 320<br>I – 00 100 ROMA Italio. | Dimanĉe | : 22h00 – 22h20 | 41.15<br>41.24<br>49.92 | 7290<br>7275<br>6010 | |
| POLA Radio – Esperanto Redakcio<br>Poŝtkesto 46<br>PL – 00 950 VARSOVIO Pollando. | Ĉiutage | : 7h00 – 7h30 | 200<br>75.84<br>48.90<br>41.27 | 1502<br>3955<br>6135<br>7270 | |
| ORF – Esperanto Fako<br>P.O. Box 700<br>A – 1041 WIEN Aŭstrio. | Dimanĉo | : 7h45 – 7h55 | 48.74<br>41.64<br>16.85 | 6155<br>7205<br>17800 | Ripeto de la antaŭa sabata programo. |
| Radio SOFIA – Esperanto Redakcio<br>SOFIA Bulgario. | Dimanĉe | : 10h30 – 10h55<br>22h05 – 22h30 | 49.42<br>50.61 | 6070<br>5928 | |
| Svisa Kurtonda Radio<br>Esperanto Fako<br>CH – 3000 BERN 15 Svislando. | Lunde | : 14h20 – 14h30 | 75.28<br>48.66<br>31.46<br>19.82<br>19.44<br>13.94 | 3985<br>6165<br>9535<br>15140<br>15430<br>17830 | |
| Radio PEKINO<br>Esperanto Fako<br>PEKINO Popola Respubliko Ĉinio | Dimanĉe | : 13h00 – 13h30<br>14h30 – 15h00 | 40 m<br>30<br>30<br>25<br>19 | | |

**POLA Radio:**

Ĉiutage : 17h30 – 18h00 41.99 71.45 / 31.45 9540 / 31.01 9675

Ĉiutage : 23h30 – 24h00 200 1502 / 75.84 3955 / 48.90 6135

**ORF:**

Sabate : 18h45 – 18h55 48.74 6155 / 16.87 17780

Marde : 19h35 – 19h45 203 1475
Ĉiun kvaran sinsekvan mardon : 27/IV/76 25/V/76 – 22/VI/76 k.t.p....

**Svisa Kurtonda Radio:**

Merkrede : 14h20 – 14h30 : kiel Lunde.

Jaŭde : 23h45 – 23h55 : 75.28 3985 / 48.66 6165 / 31.46 9535 / 31.28 9590 / 25.60 11720 / 25.27 11870

Sabate : kiel Jaŭde 23h45 – 23h55

**Radio PEKINO:**

Vendrede : 22h00 – 22h30 : 43 m / 33 / 31 / 25

Sabate : 13h00 – 13h30, 14h30 – 15h00 ) Kiel Dimanĉe.
22h00 – 22h30 ) Kiel Vendrede.

---

| | | |
|---|---|---|
| **ĈIUTAGE** : | 7h00 – 7h30 | : Varsovio. |
| | 17h30 – 18h00 | : d° |
| | 23h30 – 24h00 | : d° |
| **DIMANĈE** : | 7h45 – 7h55 | : Vieno. |
| | 10h30 – 10h55 | : Sofio. |
| | 13h00 – 13h30 | : Pekino. |
| | 14h30 – 15h00 | : d° |
| | 22h00 – 22h20 | : Romo. |
| | 22h05 – 22h30 | : Sofio. |
| **LUNDE** : | 14h20 – 14h30 | : Berno. |
| **MARDE** : | 19h35 – 19h45 | : Vieno. |
| **MERKREDE** : | 14h20 – 14h30 | : Berno. |
| **JAŬDE** : | 23h45 – 23h55 | : Berno. |
| **VENDREDE** : | 22h00 – 22h30 | : Pekino. |
| **SABATE** : | 2h10 – 2h20 | : Varsovio. |
| | 13h00 – 13h30 | : Pekino. |
| | 14h30 – 15h00 | : d° |
| | 18h45 – 18h55 | : Vieno. |
| | 22h00 – 22h30 | : Pekino. |
| | 23h45 – 23h55 | : Berno. |

**ATENTU !** Tiu hortabelo taŭgas nur dum la franca somera horsistemo ! (ek de la 28a de marto) Forprenu unu horon dum la vintra horsistemo !

**Krome** : Muritiba kaj Sorocaba el BRAZILO,
Bratislava el Ĉekoslovakio,
Sabadell kaj Valencia el HISPANIO,
Zagreb el Jugoslavio,
Gdansk el POLLANDO,
Ibra Radio el Stockholm, Svedio
elsendas en ESPERANTO. Sed tiuj radio stacioj estas malfacile kapteblaj en Francio.

Radio VATICAN elsendas mesaĝojn esperantlingvajn dumnokte de post kelkaj tagoj !

# PROTOKOLOJ

## Estrara Kunsido de U.N.E.

— ROUEN, la 14an de februaro 1976 : La estraro kunvenis ĉe Gesoj Lemarchand.

Ĉeestis : Sroj GIBAUX, JOUIS, LEMARCHAND, LOISEL, QUILLAUD, POTTIER.

La kunveno malfermiĝis je la 14h30, kaj la estraro diskutis pri la jenaj temoj :

Kaso : Nuntempe ĝi enhavas 1167,61 Fr (14/2/76).

Zamenhofa Renkontiĝo : Ĝi estis bona sukceso. Venis 42 personoj. La etoso estis agrabla kaj la programo kontentiga. Ni devos organizi tion denove.

Leĝopropono : Nur 5 deputitoj respondis al la unua letero. Sro Quillaud preparis projekton de dua letero al la deputitoj, kiuj ne respondis. Laŭ sugesto de Sro Loisel, ni sendos kopion de la unua letero al Sro Lecanuet urbestro de Rouen kaj ministro. La ĉefa afero estas nun zorgi por ke oni ne "enterigu" la proponon. Ni devos peti de U.F.E. kaj SAT Amikaro konsilojn por taŭge agi tiucele.
La Havra grupo estas preta helpi al la kaso por parte kompensi la elspezojn por la agado pri la leĝopropono.

Bulteno : La 119a estas tute kontentiga laŭ aspekto kaj enhavo. La estonta bulteno aperos komence de aprilo. Ni bezonas artikolojn pri la diversaj Normandaj urboj. Ni povus eventuale akcepti reklamojn, sed nur kondiĉe, ke ili ne ĝenu nin en nia agado.

Adresaro : La estraro ĝisdatigis la sliparon.

Venonta kongresloko : Sro Quillaud vane provis interrilatiĝi kun la estro de la Junulgastejo en Pennedepie. Eble estos necese renkonti lin surloke. Sro Quillaud zorgos pri tio.

Eliranta triono : La sorto decidis, ke Sroj Delaunay kaj Lemarchand eliros el la estraro ĉi jare, kaj Sroj Jouis kaj Pottier venontan jaron. Sroj Quillaud kaj Gibaux eliros en 1978. Sro Lemarchand skribos al kelkaj personoj por inciti ilin kandidatiĝi.

Venonta kunveno : Ĝi okazos en Yport la 10an de aprilo.

— YPORT, la 10an de aprilo 1976 : La estraro kunvenis en la Junulgastejo.

Ĉeestis : Sroj GIBAUX, LEMARCHAND, POTTIER, QUILLAUD. Senkulpiĝis Sro JOUIS.

Unue la estraro vizitis la Junulgastejon por plani surloke la diversajn aranĝojn de la venonta kongreso kiu okazos tie. La loko plene taŭgas por printempa renkontiĝo.

Normanda Federacio de U.F.E. : Sro Pottier raportis pri la ĝenerala kunveno de la Federacio kiu okazis en CAEN la 21an de marto.

Ĝenerala kunveno de U.N.E. : Ĝi okazos Sabaton la 8an kaj dimanĉon la 9an de majo en la Junulgastejo de YPORT.
Sro Gibaux zorgos por ke artikoloj aperu en la lokaj taĝurnaloj : Paris-Normandie, Havre-Presse, Havre-Libre, sub la rubriko "YPORT" por anonci ekspozicion (libroj, gazetoj- diversaj dokumentoj) malfermetan en la junulgastejo dum la du tagoj kiam okazos nia renkontiĝo.

Bulteno : Sro Lemarchand, pro diversaj personaj motivoj, ne povos daŭrigi la eldonadon de la bulteno ek de 1977. Li zorgos pri la 4 venontaj bultenoj : aprilo, junio, septembro, decembro 1976a. Li petas, ke oni ekde nun pripensu trovi anstataŭanto(j)n, por redakti, tajpi la stencilojn, multobligadi, finpretigi kaj sendadi la bultenon venontan jaron.
La ĝenerala kunveno priparolos tiun problemon.

Leĝopropono : Sro Lemarchand legas la du leterojn, kiujn li ricevis de U.F.E. (Sro Guillaume) kaj de SAT Amikaro (Sro Grandière) kun diversaj konsiloj por subteni surloke la leĝoprojekton.
Sro Quillaud sendis revokan leteron al la deputitoj kiuj ĝis nun ne reagis.

## VENONTA ESTRARA KUNVENO

Ĝi okazos en la kadro de nia Printempa Renkontiĝo en la Junulgastejo de YPORT la 9an de majo 76.

La venonta estrara kunsido okazos en YVETOT ĉe Gesoj POTTIER, 21 allée des Roitelets, sabaton la 12an de junio 76a ekde la 14a horo. Interesuloj estas kompreneble tute kore akceptotaj !

# NIA VIVO EN ...

## CAEN

## NORMANDA FEDERACIO de U.F.E.

La dimanĉon 21an de marto, okazis en CAEN sub prezido de Sino VINCENT, la jara kon--greso de la Normanda Federacio de U.F.E. De longe, la ĉefurbo de Basnormandio, ne estis ricevinta tian kunvenon. Kvankam ne nombra, la ĉeestantaro realigis maloftan faron, tie grupigi esperantistojn de la kvin normandaj departementoj.
La ejo estis ĉambro de la aparte taŭga "Centre Socio Culturel du Chemin Vert" afable metita je la dispono de la kunvenintoj. Sro ROUSSEAU.

La 8an de aprilo okazis en Caen, la unua kunveno de la lokaj Samideanoj kun la jenaj celoj :
- kreo de Caen-a esperanto grupo.
- diskuto pri kreo de publika kurso, post taŭga informa kampanjo.

La estraro de U.N.E. sendas siajn plej varmajn bondezirojn al la Caen -aj Samideanoj, por la estontaj, nepre fruktedonaj, agadoj de tiu nova loka grupo !

## LE HAVRE

JARA FESTO : 21.02.76. :

Ĝoja etoso regis dum la Jara Festo de l'Grupo, kiu arigis 39 perso--nojn en simpatia etoso kaj ĉambro. Inter tiuj, ni kun feliĉo vidis Samideanojn el Yvetot kaj Bouville, kiuj ne timis la riskojn de la vintra sezono por veturi ĝis Le Havre...
Se oni povas sugesti ke la aperitivo varmigis la kapojn, estas dirinde ke ankaŭ la koroj batis varme ; aliparte oni scias ke ni Francoj, ŝatas telerojn kaj glasojn, kiam ili estas plenaj : neniu povis plendi pri vana promeso tiurilate ! kaj la stomakoj havis sian ple--zuron !
Post plenigo de la ventro, la spektaklo ; ĉar ja oni alkutimiĝas je tio dum niaj festetoj - oh, temas pri tute modestaj prezentaĵoj - sed ili fariĝas tradiciaj, kiel ekzemple la arton de "nia" magiisto (kiu prenas la nomon "Ludovik") kaj renovigis sian mistifikan programon finanta per aperigo de fulardo surhavanta la saluton "Ĝis revido !" Plie en dua parto, li eĉ favoris nin per ventroparola prezento kun sia "filo" Luizo : tre bone ! ne multaj Esperanto-Grupoj povas ĝui tion !
La ĉe-estantaro, kun plezuro, miris pri la granda nombro de junuloj kiuj partoprenis en la sekvanta programo : ĉu ĉe elektronika klavaro, ĉu per duopa gitarprezento, ĉu per duopa flutludado, ĉu la "Yvetota gitara teamo", kun kantoj, ĉu per skeĉo, ili kun konscienco kaj arto distris nin, kantigante la tutan salonon, kuntrenante nin per sia dinamismo...
Dankon, karaj gejunuloj ! vi revigligis la koron de la "malnova gvardio".
Ni substreku alian punkton : se ĉiuj ĝuis la Feston, notu ke ĉiuj partoprenis en ĝia prepa--rado.
La Havra gazetaro favore raportis pri tiu manifestacio.

Monataj Kunvenoj :
la antaŭvidita parolado de Sro P. MARY ne povis okazi dum januaro : tiu prezento okazos la 24an de aprilo, je la 17a horo ĉe la ĉambro François ler, kun bildoj filmo, muziko....

Akcepto de Anglaj Samideanoj :
11a kaj 12a de Septembro : grava dato : tiam, niaj ge--amikoj el Southampton vizitos nin. El la provizora programo : Akcepto de la Urbestro, bankedo, komuna vespero.

Nepre rezervu la daton !

Sro GIBAUX

N O V A ! A M U Z A !

Por viaj Kunvenoj,
Festoj,
Kongresoj,

LA ESPERANTISTA MAGIISTO

L U D O V I K

Ĵonglisto
Ventroparolanto
(kun sia filo LUIZO

Skribu al S-ro L.LANEY
91 rue de la Laiterie
76610 LE HAVRE

# VIRE

La urbo VIRE, 12000 enloĝantoj, kuŝas en la sudokcidenta parto de departemento Calvados. La ĉirkaŭa regiono, "le Bocage" konsistas el montetoj, inter kiuj sufiĉe granda nombro superas 300 metrojn. La regiona grundo konsistas el granito, ŝisto kaj sabloŝtono. La valoj estas sufiĉe profundaj, la kamparo riĉa je malgrandaj herbejoj, arboj kaj heĝoj. El multaj lokoj estas videblaj vastaj belaj panoramoj.
VIRE 90 % detruita je la 6a de junio 1944 estas moderne rekonstruita. Ĝiaj monumentoj, belfrido, preĝejo, kastela ĉefturo, estas ja vizitindaj. Apud Vire, en pentrindaj valoj "Vaux de Vire", vivis (16a jarcento) poeto, kies versaĵaro havis titolon "Vaux de Vire" kaj estis la origino de la vorto "Vaudeville".
En VIRE estas gravaj buter-fabrikoj (Virlux). La urbo estas fama pro siaj delikataj fumaĵitaj tripkolbasoj. Tie vi tre bone manĝas. (Bongustaj estas la kukaĵoj.)
En la regiono vi povos tre agrable ekskursi al pentrindaj lokoj (ĉefe al "Suisse Normande," Arbaro kaj preĝejo de Saint Sever, kastelo de Pontécoulant).
La faldfolio pri la urbo surhavas esperantlingvan teksteton Por informoj oni sin turnu al : Office Municipal du Tourisme Square de la Résistance. 14500 VIRE. Calvados.

Sro LEGRET.

## CHRONIQUE ESPÉRANTISTE

Un important article sur Vire et le Bocage vient de paraître — dans la revue espérantiste écossaise « Monda Karuselo ». Auparavant (avant et après la Libération) Vire et sa région ont été l'objet de plusieurs articles dans diverses revues espérantistes.

Une quinzaine de membres du groupe espérantiste du Havre se sont rendus, le 3 octobre dernier, à Southampton ville jumelée avec Le Havre. Ils y avaient été invités par la municipalité du port anglais. Ils y furent reçus par Mme Pugh, maire, qui à leur surprise, leur souhaita la bienvenue en espéranto. Ils lui transmirent le message d'amitié de M. Duroméa, maire du Havre. Ils furent ensuite hébergés par leurs amis espérantistes. Ils visitèrent successivement l'Hôtel de Ville, le College Technique, la vieille ville (Hampton) et le « Centre Civique » où sont groupés très commodément toutes sortes de services municipaux. Au club espérantiste eut lieu une soirée de chants et de variétés très animée (à laquelle assistait un parlementaire anglais). Les espérantistes havrais comptent bien recevoir, cette année, leurs amis anglais.

Le prochain Congrès Universel d'Espéranto aura lieu à Athènes, du 31 juillet au 7 août. La Grèce attire naturellement beaucoup de personnes. Un très grand nombre d'adhésions au Congrès ont déjà été enregistrées. De magnifiques excursions seront organisées (au Cap Sunion, à Delphes, etc). Auparavant, les jeunes espérantistes auront tenu leur Congrès à Thessalonique. Les deux Congrès sont organisés par l'Association Espérantiste Universelle dont le siège est à Rotterdam.

« Pour que les peuples s'entendent, il faut d'abord qu'ils entendent. Que l'espéranto rende l'ouïe à ces sourds muets dans leurs langages depuis des millénaires ». Romain Rolland.

Pour tous renseignements sur l'espéranto, s'adresser à LEGRET A., 14 rue des Sablonnières, Vire, ou à l'Union Française pour l'Espéranto, 4 bis rue de la Cerisaie, Paris (4e).

el "La Voix du Bocage"
20an de februaro
76.

# YVETOT

La 18an de januaro okazis la kutima Reĝkuka Festo de la grupo en la restoracio de la Junuldomo. Ĉi-jare ĝi estis vera sukceso, ĉar 70 personoj el Yvetot, Rouen, Le Havre kaj Fécamp ĉeestis ĝin.
Ankaŭ la etoso estis bonega, kaj kelkaj junuloj el Yvetot kantis kaj ludis gitaron; aliaj junuloj el le Havre talente prezentis la skeĉon "Kolbasoj".
Fine, kiel kutime, Patro Kristnasko disdonis ludilojn al ĉiuj infanoj.
Iom post tiu festo malfermiĝis nova kurso por komencantoj kun 3 lernantoj. La 2 aliaj kursoj daŭre kontentige funkcias 6 personoj el Yvetot ĉeestis la feston de la Havra Grupo en Februaro.

Sro POTTIER.

# GRAND QUEVILLY

Sro QUILLAUD ĉiam en la kadro de la laika amikaro Calmette Bastié, Salengro gvidas progresigan kurson por 4 gelernantoj

Dum la lasta komuna kunveno de la ROUEN kaj GD QUEVILLY -grupoj, la 15an de aprilo, ni kun plezuro akceptis junan amikon el Britio. Efektive, Sro Hilary CHAPMAN, instruisto pri la Franca kaj Germana lingvoj en HINCKLEY apud LEICESTER kaptante la okazon de vojaĝo, kun grupo da anglaj gejunuloj el tiu urbo, en nia regiono, povis ĉeesti nian kunvenon. Dank'al nia internacia lingvo, ni povis dum la vespero interŝanĝi ideojn kaj spertojn pri la vivo de niaj baldaŭ ĝemelitaj esperanto-grupoj.

Espereble la rilatoj fariĝu pli kaj pli oftaj dank'al korespondado kaj, kial ne, pro personaj interŝanĝaj vizitoj.
Plezure ni presigas anonceton de nia amiko HILARY :

"La Esperanto-parolantoj en HINCKLEY ŝatus korespondi kun E°-parolantoj en Normandio, pro la ĝemeliĝo de HINCKLEY kun GRAND QUEVILLY. Sendu vian nomon, adreson kaj interesojn al Sro Hilary CHAPMAN , 7 Fairacre Road - BARWELL - Leicester, LE9 8HH. Britio."

Y P O R T
7 6

# PROGRAMO de la JARA RENKONTIĜO

SABATON la 8an de majo :


- Ek de la 14a horo : akcepto de la kongresanoj en la Junulgastejo de YPORT 26 rue Emmanuel Foy.
- Libera posttagmezo : promenado tra Yport kaj la regiono. ludoj
- estrarkunsido de U.N.E.
- 19a horo : vespermanĝo.
- 20h30 : interfratiĝa vespero.


DIMANĈON la 9an de majo :

- 9a horo : Generala Kunveno de U.N.E.
  - Saluto de la nuna prezidanto.
  - Agadraporto 1974/75.
  - Financa raporto 1974/75.
  - Agadraportoj de la grupoj.
  - Kotizoj 1976.
  - Elekto de la unua triono de la estraro.
  - Elekto de la loko por la venonta ĝenerala kunveno de U.N.E.
  - Elekto de la kontreviziistoj.
  - Agadplano 1975/76.
  - Bulteno
  - Renkontiĝoj : aŭtuna , Zamenhofa ....
  - Diversaĵoj, proponoj, sugestoj, kritikoj...
- 12h30 : Komuna simpla tagmanĝo.
- Posttagmeze :
  - libera posttagmezo.
  - Estrakunsido de la nova estraro de U.N.E.
  - Promenadoj, vizitoj en la ĉirkaŭaĵoj.
  - Ludoj, kantoj, ktp...
- 17a horo : Adiaŭa teo kaj festeto .

P.S. :
- Ne forgesu kunporti kantlibrojn kaj muzikinstrumentojn !
- Por tiuj kiuj intencas tranokti en la Junulgastejo, estas necese kunporti littukojn Estas litkovriloj en la domo.
- Eblas tranokti en "Hotel Normand" rue Emmanuel Foy 76111 YPORT - Telefono : 27 30 76 kiu situas tute apude de la Junulgastejo. Dormĉambro + sabata vespermanĝo + dimanĉa matenmanĝo : 34,00 Fr po persono. Se tio interesas vin, bonvolu rekte rilati kun la estro de la hotelo. Nia asocio ne estos respondeca por tiu tranokta rimedo.
- Eblas ankaŭ tendumi en la tendumejo kiu situas sur la vojo al Froberville, 4 km for de YPORT.
- Dum la tuta kunveno, okazos en la Junulgastejo, ekspozicio pri esperantaj libroj, gazetoj kaj diversaj dokumentoj. Ĝi estos malfermata al la neesperantista publiko.

GRUPGVIDANTOJ ! GRAVE ! : Bonvolu organizi aŭtokaravanojn por komune atingi YPORT. Rilatu kun viaj grupanoj. Antaŭdankojn !



# Elekto de la Nova Estraro

YPORT 1976

# VOĈDONILO

La sorto elektis Srojn Delaunay kaj Lemarchand kiel elirantoj por la unua triono de la estraro elektita lastjare en Val de Saône.
Laŭstatute ili estas reelekteblaj, kaj estas denove kandidatoj. Ĝis nun ni ricevis nenian alian peton pri kandidatiĝo. Tamen vi rajtas anstataŭi unu nomon per alia, kondiĉe ke la koncerna persono akceptu esti kandidato.

Estas kandidatoj : Sro DELAUNAY el Rouen;
Sro LEMARCHAND el Rouen.

Se vi ne povus partopreni la ĝeneralan kunvenon de U.N.E. en YPORT la 9an de majo 1976, bonvolu resendi tiun voĉdonilon al :
Sro POTTIER, 21 allée des Roitelets 76190, YVETOT. Antaŭ la 5an de majo 76.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

# U.N.E.

YPORT la 9an de majo 1976a.

# RAJTIGILO

Se vi ne povas partopreni la ĝeneralan kunvenon de U.N.E. en YPORT, bonvolu resendi tiun rajtigilon al Sro POTTIER, 21 allée des Roitelets 76190, YVETOT. kune kun via voĉdonilo.

Mi, subskribinta (nomo),

ne povas ĉeesti la ĝeneralan kunvenon de U.N.E. Mi transdonas mian povon al :

Sinjor(in)o :

kaj petas lin / ŝin agi en mia nomo pri ĉiuj decidoj, kaj pri la baloto pri la elekto de la unua eliranta triono de la estraro.

Dato kaj subskribo :

(Super la subskribo, bonvolu permane skribi : "Bon pour pouvoir.")

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

# INTER NI

Kun ĝojo ni estis informitaj antaŭ nelonge pri nova naskiĝo en la simpatia familio ROUSSEAU el CAEN.
Do, bonvenon kaj bondezirojn al LUC (24/I/76) kaj gratulojn al la gepatroj !
Bonvolu noti la novan adreson de Gesoj ROUSSEAU, Parc Viking 14920 - MATHIEU.

" KAPABLECO " : Bonvolu aldoni al la antaŭaj listoj : Sro ROUSSEAU el MATHIEU.

.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

NI ATENDAS VIN EN YPORT !

Kaptu la okazon, apud la marbordo, en agrabla urbeto, plezure ĉeesti nian ĝeneralan kunvenon !

.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

**ne forgesu vian jaran kotizon al U.N.E**
**5,00 fr. minimume. Dankon !**
**c.c.p. : Rouen 283 40 H**

SOLVO de la lastaj PERLITERAJ OPERACIOJ !

NAZO :

| A | E | H | M | N | O | U | Z |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | 0 | 2 | 4 | 8 | 6 | 3 | 7 |

ORIO :

```
6716 | 46
211  |----
 276 | 146
  00 |
```

# U.N.E. KONGRESO

Resendu la aliĝilon al Sro JOUIS
621 rue Georges Mugnier
76230 - Boisguillaume.
kune kun la antaŭpago. Dankon !

Y P O R T 1976

# ALIĜILO

8 / 9an de majo 1976a.

NOMO : ANTAŬNOMO :

ADRESO :

Bonvolu [X] en la taŭga loko ! Dankon ! Ni konsilas al vi, fari kopion de tiu ĉi ali--ĝilo kaj kalkulo, kaj ĝin konservi.

☐ Mi venos sola 1 persono

☐ Mi venos kun alia(j) persono(j)

- Edz(in)o : .........
- Infano : .........
- Infano : .........
- Infano : .........
- Alia parenco : .........

Bonvolu indiki dorse de la ĉeko: " YPORT Renkontiĝo. "

Nombro da personoj : ☐

DATO de ALVENO :

1) - Mi alvenos sabate posttagmeze aŭ vespere [jes] aŭ [ne]

☐ Mi loĝos en la Junulgastejo. (Necesas kunporti littukojn)

☐ Mi ĉeestos la kunvenon, sed revenos hejmen por tranokti.

2) - Mi alvenos dimanĉe matene [jes] aŭ [ne]

☐ Mi deziras partopreni komunan simplan tagmanĝon : por ☐ persono(j)

☐ Mi deziras mem prepari mian manĝon. Estas gasaparato, kaj manĝilaroj en la Junulgastejo.

DISTRA VESPERO :

☐ Mi intencas kanti, diri poemojn aŭ rakontojn.

☐ Mi intencas organizi ludojn aŭ teatraĵojn.

☐ Mi montros lumbildojn aŭ filmojn.

☐ Aliaj sugestoj : ....................

ANTAŬPAGO : Kiu aliĝas, tiu antaŭpagu la tuton. En okazo de lastminuta nepartopreno la Kasisto repagos escepte de la aliĝkotizoj.

Mi sendas ĉi kune bankĉekon aŭ poŝtĉekon de :................... Fr.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Por : Aliĝo | : | x 6,00 Fr | = |
| Subtenkotizo (Libervola) | : | x | = |
| Komuna tagmanĝo dimanĉe | : | x 15,00 Fr | = |
| Tranoktado en la Junulgastejo | : | x 8,50 Fr | = |

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE :
c.c.p. : ROUEN, 283 40 H.

SUMO : ☐

DATO : SUBSKRIBO :